

# La 1an de novembro 2016

## Lasttatempaj movoj kontraŭ la nuklea politiko

### Juĝdebatoj en la juĝejo en mia urbo finiĝis

La 31an de oktobro okazis fermo de juĝdebatoj en la Distrikta Tribunalo de Maebaŝi, Gunma. La juĝistaro anoncis, ke ĝi verdiktos la 17an de marto 2017. Temis pri postulo de kompensa mono de la suferantoj en Gunma pro la nuklea akcidento en Fukuŝima okazinta en marto 2011.

La 11an de septembro la akuzantaro konsistanta el 137 homoj el 45 familioj el Fukuŝima, ĉefe loĝantaj en la gubernio Gunma, postulis kompensan monon de TEPCO en la juĝejo. La 25an de aprilo 2014 la unua buŝa pledo okazis. La 15an de decembro ĉiuj 137 akuzantoj prezentis sian pledon al la juĝejo. Entute okazis 25 juĝkunsidoj kaj fine la 31an de oktobro 2016 la juĝdebato finiĝis.

En tiu juĝo la akuzantaro pledis jene:

1. La akuzantoj estis pelitaj de sia hejmo pro la akcidento de la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima. Ili perdis sian hejmlokon, bazon de sia vivado kaj feliĉan vivon. Kvin jarojn poste iuj ankoraŭ ne povas reveni al Fukuŝima, iuj vivas aparte de siaj familianoj kaj aliaj loĝas solece en fremda loko en Gunma.
2. Ili postulas, ke en la juĝejo klariĝu la kialoj de la akcidento. Oni povis antaŭvidi grandegan cunamon, sed TEPCO faris nenion por preventi la akcidenton kaj la ŝtato ne gvidis la kompanion. Ili ambaŭ estas kulpaj pri tiu akcidento.
3. Ili pledis, ke la juĝejo juĝu rapide por savi la suferantojn en malfaciloj plej frue.
4. Ili postulis 10 milionojn da enoj (100 mil eŭroj) da kompensa mono de TEPCO.

Mi multfoje ĉeestis ĉe la juĝkunsido kaj sentis, ke la ĉefjuĝistino Hara estas tre simpatia al la akuzantaro kaj male agis tre severe al la advokatoj de TEPCO kaj la ŝtato. Ŝi sincere aŭskultis la pledojn de la akuzantoj. Ŝi konsentis al rapida juĝado postulata de la akuzantaro, tiel ke preskaŭ ĉiun monaton okazis juĝkunsido, sekve okazos la verdiktado plej frue el la dudekelkaj similaj juĝadoj okazantaj en Japanio.

Pri sincereco de la ĉefjuĝistino iu skribis jene: “Dum la 25 juĝkunsidoj la plej impresa estis tiu okazinta la 25an de aprilo 2014. En ĝi okazis la unua pledo kaj virino pledis. Ŝi parolis pri tio, kiamaniere ŝi fuĝis kaj atingis la gubernion Gunma, dume ŝi ekploris kaj ekstremis, kaj fine ŝi falis. Ĉiuj rigardis ŝin kun granda maltrankvilo. Ŝi ne estis tre malsana, sed ŝi devis eliri el la juĝejo, helpate de juĝejaj funkciuloj. Poste la ĉefjuĝistino voĉlegis ŝian restantan pledon ĝis la fino, kaj deklaris, ke tiu estu ŝia pledo. Mi estis emociita pro ŝia sincereco.

Post la fermo de juĝdebatoj okazis raportkunsido. En ĝi advokatoj raportis pri 5 jaroj da juĝado kaj poste du akuzantinoj salutis. Mi tradukos saluton de s-ino Tanĵi Sugie.



Koran dankon pro via ĉeesto kaj koran dankon pro via subteno. Mi estas certa, ke via konstanta subteno kuraĝigis la juĝantaron kaj fariĝos granda motoro por la ebla justa verdikto.

Mi perdis du parencojn post la nuklea akcidento, tial hodiaŭ mi venis ĉi tien en funebra kostumo.

En julio 2011 mi rifuĝis en la urbon Maebaŝi, postlasinte miajn karajn amikojn. Mi memvole rifuĝis, ne devigite de la registaro, ĉar mi kaj mia edzo loĝis ekster la malpermesita zono, do mi ĉiam havis peksenton pro tio. Ĉiun tagon mi demandis min, ĉu mia elekto estis ĝusta, kaj ĉu ni devintus resti tie por batali kune. Hodiaŭ venis 15 homoj el la urbo, kie mi loĝis, do mi estas des pli feliĉa vidi ilin.

Mi dankas ankaŭ al la advokatoj, kiuj subtenis nin dum la pasintaj 3 jaroj. Ili sincere etendis helpmanojn al ni. En Gunma ĉiu akuzanto estas prizorgata de sia respondecula advokato. Ĉiuj staris ĉe la atestejo kun grandaj maltrankvilo kaj timo. Tiam la advokatoj kaj la subtenantoj varme subtenis nin. Ni elkore dankas vin. Ni tiamaniere paŝis man-en-mane kun forta fido.

Mi dufoje pledis. Mi komencis la pledojn per vortoj “TEPCO kompensu niajn perditajn tagojn plenajn de teruro kaj soleco” kaj finis per vortoj “Se ne estus nuklea centralo, se ne estus tiu nuklea akcidento, ...”. Ĉiuj suferantoj havas siajn proprajn malfacilojn, sed kio okazigis tiujn, tio estis la nuklea akcidento.

En la tago de la akcidento, sen informo pri la fluganta nukleaĵoj restis multaj homoj en tiu danĝera loko kaj vicis multaj gepatroj kun siaj infanoj en pluvo kaj en neĝo atendante akvon. Ili bedaŭras sian agadon en tiu tago kaj kritikas sin. Poste la registaro diris, ke radioaktiveco de 20 milisivertoj aŭ eĉ 100 milisivertoj ne estas danĝera, sed ĉu ni povas kredi tion?

Kiu povas trankviligi tremantajn patrinojn, kiuj kredas, ke nuklea bombo instalita en la korpo de siaj gefiloj povos eksplodi iam ajn. Kiuj estas kulpaj kaj kiuj devas pardonpeti de ili? Kiuj devas respondi al la demando de iu infano: “Ĉu mi povos plenkreski? Ĝis kiam mi povos vivi?” Eĉ se ni povos reveni hejmen, ni ne povos reakiri eksan trankvilan vivon.

En la juĝkunsidoj s-ino A, kiu rifuĝis kun tri infanoj, rakontis kun tremantaj voĉoj, ke ekde tiu tago komenciĝis infero. S-ino B perdis sian edzon dum la rifuĝado, s-ino C rezignis naski bebon, s-ino D estis maltrankvila, timante, ke siaj gefiloj ne estos akceptita de la samklasanoj en lernejo... ĉiuj 137 akuzantoj rakontis siajn malfacilojn sur la tremantaj piedoj kaj kun larmoj, klarigis danĝeron de nuklea energio kiel sinceraj kaj fieraj homoj kaj pledis, ke TEPCO kaj la registaro pardonpetu de ili.

Je ĉiu juĝkunsido pli kaj pli multiĝis paperoj sur la tabloj de la advokatoj. Ĉiuj vortoj en ili estas akumulado de malĝojoj, perdoj kaj angoroj de la fukuŝima-anoj. Sed TEPCO kaj la registaro neniam akceptis eĉ unu paĝon de niaj pledoj. Male la atencintoj staradas arogante supre de la atencitoj.

Kion ni povas fari nun, tio estas, ke ni postulu justan verdikton kaj ni pli forte tenu manojn de amikoj. Ni ne almozpetas kompenson de TEPCO kaj la registaro, sed ni postulas tion kiel nian rajton.

Antaŭ 60 jaroj la registaro oficiale agnoskis, ke la Minamata-malsano estis kaŭzita de la kompanio Ĉisso, kiu enfluigadis hidrargon en la maron kaj solvado de la afero komenciĝis, sed ankoraŭ nun troviĝas suferantoj sen kompenco kaj sen medicina helpo. Nia batalo kontraŭ radioaktiveco ne videbla, ne odora kaj ne doloriga daŭros longege trans generacioj kun timo de iam ajn eksplodebla malsano. Ĉiuj suferantoj diras: "Ne plu okazu la sufero, pro kiu mi nun suferas". Ĉiuj suferantoj de Fukuŝima samopinias. La plej malbonan, la plej grandan akcidenton ni spertis, tial ni volas fari, kion ni povas fari nun por la estonta vivo, por la estonta mondo. Kun tiu kredo mi metis nian aferon al juĝo.

La juĝejo verdiktos en marto en 2017, tamen tio estos nur komenco de nia batalo. TEPCO kaj la registaro senhonte apelacios, kiam ili malvenkos en tiu ĉi juĝejo. Ĝis ili aprobos sian kulpon kaj pardonpetos de ni kaj ĝis ni reakiros trankvilan vivon, ricevonte sufiĉan kompenson, ni decidis batali kaj ni ne rezignas batali.

Al vi, advokatoj kaj subtenantoj, ni elkore dankas. Ĝis la fina venko, ni kune paŝu man-en-mane.

## **Elektiĝis du guberniestroj, kiuj kontraŭas nuklean energion**

En julio elektiĝis s-ro Mitazono Satoŝi kiel la guberniestro de Kagoŝima, en kiu troviĝas nuklea centralo Sendai. Li postulis haltigon de tiu centralo, kvankam li ne havas potencon ordoni tion. La kompanio Kjuuŝuu, kiu posedas tiun centralon, rifuzis lian peton. La opinio de la guberniestro, nome opinio de la gubernianoj, havas gravan signifon, do la kompanio ne povas simple ignori lin. En la najbara gubernio Kagoŝima okazis sinsekve grandaj tertremoj en aprilo, do la loĝantoj en Kagoŝima havas grandan timon de la eventuala akcidento de la nuklea centralo en sia gubernio.

En oktobro elektiĝis s-ro Jonejama Rjuuiĉi kiel la estro de la gubernio Niigata. En Niigata troviĝas la plej granda nuklea centralo en la mondo, nome tiu de Kaŝiŭazaki-Kariŭa. En tiu centralo, kiu havas sep reaktorojn, okazis granda akcidento kaŭzita de la tertremo en 2007. Nun ĉiuj reaktoroj ne funkcias, sed TEPCO intencas funkciigi ilin.

La registaro decidis forĵeton de la regenera reaktoro Monĵu, kiun oni malsukcesis funkciigi dum la pasintaj 20 jaroj, kvankam oni elspezis al ĝi 1000 miliardojn da enoj

(10 miliardojn da eŭroj). La registaro planis produkti plutonion el uzita uranio per Monĵu por ke Japanio eterne posedu malmultekostan nukleajn brulaĵojn. Ĉu por tenadi ĝin aŭ ĉu por forĵeti ĝin, ni bezonos multegon da mono kaj oni tute ne scias, kiamaniere forĵeti ĝin sekure.

Laŭ enketo de la ĵurnalo Asahi, 57% de la japanoj kontraŭas refunkciigon de nukleaj reaktoroj, dume 29 aprobas tion.

### Najbaraj landoj

En Tajvano, la kabineto decidis haltigi ĉiujn tri reaktorojn ĝis 2025. Post la nuklea akcidento en Fukuŝima, kontraŭ nuklea energio tiel evoluis, ke oni decidis ne plu konstruadi la konstruatan reaktoron n-ro 4.

(laŭ la ĵurnalo Akahata la 24an de oktobro 2016)

En Vjetnamio multaj tri ĉinaj reaktoroj, kiuj Vjetnamio.

En Vjetnamio oni centralon sub la gvido de nuklea akcidento en timo, sekve la registaro konstruadon ĝis 2020.



kontraŭas funkciigon de situas proksime al

planis konstrui nuklean Japanio, sed post la Fukuŝima, grandiĝis decidis prokrasti la

### HORI JASUO